

ĈU OPIO AŬ ADRENALINO?

(artikolo publikigita en 'NIGRIZIA', n.ro 11 novembro 2010)

(Mt 5,1-15)

"Religio estas opio de la popoloj". Per tiu senreplika aserto, Karl Marx denunciadis la danĝeron de la religioj. Ne malpravus Marx. Se iu religio estas uzata de riĉuloj kaj povtenantoj por gardi la regadon super amaso da malriĉuloj kaj subprematoj, ĝi vere estas opio, tio estas narkotaĵo kiu senefikigas la energiojn kaj la vivigajn fortojn de la popolo. Sur la benko de la akuzitoj, unuavice inter la religioj, estis laŭ Marx, ĝuste kristanismo, kaj aparte la mesaĝo de Jesuo konata kiel "beatecoj".

Iu religio en kiu oni proklamadis beataj la malriĉulojn, ĉar ĝuste pro ilia mizero ili havis la paradizon certigita, estis sendube religio freneziga. Kiel eblis diri al suferantoj, al malsatantoj, ke ili estis beataj? Ĉar post la kalvario de ilia ekzistado, kiel 'premio' ili estis portataj unuavice en paradizon. Iu paradizo, tamen, kiu ne nur ne estis malpermesata al riĉulo, eĉ tiu certigis al si la transmondon lasante malavarajn donacojn por celebrado de ĉiamaj mesoj post sia morto. Kaj la malriĉuloj sentadis sin primokataj kaj sur ĉi tiu tero kaj sur la estonta.

La predikado de tiu ĉi mesaĝo povis esti nenio alia ol fiasko. Fakte, la malriĉuloj, la suferantoj kaj la malsatantoj, je la unua okazo kiun la vivo proponadis al ili por eliri de propra mizero kaj sufero, ne pensadis dufoje, lasante malriĉecon kaj beatecon sen ajna bedaŭro. Aliflanke, tiuj kiuj ne troviĝis en tia mizera kaj subpremata kondiĉo tre zorgis ne eniri ĝin, dekretante tiel la fiaskon de la mesaĝo de Jesuo.

Pro tio la beatecoj estas la grandaj nekonatoj de la kristana doktrino. Ilin oni ne konas aŭ konas malbone. Ĉiuj certe memoras la unuan beatecon, eble ĉar la plej malsimpatia ('Beataj la malriĉuloj...'), pri la cetero estas kiel se Jesuo estus proklaminta beataj la malbonŝanculojn de la socio kaj beatiginta tiujn kondiĉojn de sufero kaj doloro en kiujn ĉiu persono mens-sana tre zorgas ne eniri kaj el kie, se malbonŝance li en ĝi troviĝas, li klopodas ĉiel eliri.

Ĉu vere Jesuo proklamis beataj la malriĉulojn? Kaj se li tion faris, kial la malriĉuloj estas beataj? Kial ili poste iras en la paradizon, en tiun transmondon en kiun ankaŭ la riĉuloj rajtas eniri?

La respondo troviĝas en la evangelioj. Kaj la surprizo estas ke neniam Jesuo proklamis beataj la malriĉulojn, tiujn kiujn la socio malsatigas kaj subpremas. Jesuo ne venis por sanktigi la malriĉecon, sed por ĝin forigi. Kristo ne venis por mildigi per beatiga alvido la tragedion de la ĉiutaga vivo de la malriĉuloj, sed por eltiri la mizerulojn el la kondiĉo de mizero kaj doloro.

La beatecoj en la evangelioj troviĝas en Mateo kaj en Luko (Mt 5,1-10; Lk 6,20-23). La formoj estas malsamaj, la mesaĝo sama. Dum en Mateo la invito estas al tiuj kiuj volas iĝi mizeraj (Beataj la malriĉaj je spirito), en Luko Jesuo sin adresas al la disĉiploj kiuj jam faris tiun elekton (Beataj vi malriĉuloj, Lk 6,20) kaj lasis ĉion por lin sekvi (Lk 5,11).

Jesuo, la Filo de Dio, volas konduki al plenumiĝo la volon de la Patro, kies ĉeesto sine de la popolo estus garantiata de la fakto ke en ĝi neniu estus estinta bezonhava ("Estos neniu bezonhavulo inter vi", Readm 15,4). Estas tio kion komprenis la primitiva kristana komunumo kiu "tre vigle atestis la resurekton de la Sinjoro Jesuo" (Ag 4,33). Kiel povis tiu komunumo atesti la ĉeeston de la Resurektinta en sia eno? Ĉu per doktrinaj proklamoj? Per pompaj liturgioj? Ne, per ilia vivo. La pruvo de la Kristo resurektinta estis fakte ĉemane, ĉiuj povis ĝin vidi. "Neniu fakte inter ili estis bezonhava... (Ag 4,34). La certeco ke Kristo ĉeestas en iu komunumo estas ke ene de ĝi ne ekzistas malsimilecoj, riĉuloj kaj malriĉuloj, kiu estras kaj kiu servas, sed ĉiuj estas kaj kondutas kiel gefratoj, respondecaj la unuaj de la feliĉo kaj de la bonfarto de la aliaj.

Pro tio, proklamante la beatecojn, Jesuo referencas al la lasta el la ordonoj de Moseo, "Vi ne deziras ajnan aĵon kiu apartenas al via proksimulo" (Eli 201,7; Dt 5,21), kaj donas al ĝi kontinuecon ĝin transformante en pozitivan inviton: deziru ke via proksimulo havu viajn samajn aĵojn. Tiu estas la signifo de la unua beateco: invito prizorgi la bonon kaj bonfarton de la homaro ("Beataj la malriĉaj je spirito, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo", Mt 5,3).

La memvola decido eniri en la kondiĉon de malriĉeco estas prezentata de la evangeliisto kiel la ĉefa beateco kaj kondiĉo por la ekzisto de ĉiuj aliaj. La sep beatecoj kiuj sekvas estas nenio alia ol la prezento de la situacioj kaj de la pozitiva sekvo kiujn la elekto je malriĉeco kuntrenas en la socio (Mt 5,4-6) kaj en la komunumo (Mt 5,7-10).

Jesuo proklamas beataj, tio estas komplete feliĉaj, ne tiujn kiujn la socio malriĉigis, sed tiujn kiuj propravole eniras tiun kondiĉon por mildigi kaj elimini la kaŭzojn de la malriĉeco. La invito de Jesuo fakte estas adresata al la malriĉaj 'je spirito', al tiuj kiuj libervole kaj propravole, pro amo, pro la spirito kiu ilin animas, eniras la kondiĉon je malriĉeco. Tiu de Jesuo ne estas peto seniĝi je tio kion oni havas, sed malseniĝi tiujn kiuj havas nenion, malkovrante tiel ke la feliĉo ne konsistas en la posedo, sed en la donado (Ag 20,35).

La beateco estas invito radikale transformi la socion kaj tiel permesi la alvenon de la Regno de Dio. Pro tio la beatecoj estas antaŭigataj per la invito al konvertiĝo por konsenti la realigon de la regno de Dio (Mt 4,17). En iu socio regata de la tri malbenataj verboj havi, suprenleviĝi, estri, kiuj kaŭzas en la homoj rivalecon, malamon kaj maljustecon, Jesuo proponas kiel alternativon la regnon de Dio, la kadron kie, anstataŭ la avideco posedi ĉiam plie, estu la kundividado, kie anstataŭ la suprenleviĝo super la aliaj estu la malsupreniro flanke de la lastaj, kaj kie anstataŭ la dezirego estradi estu la ĝojo servi.

Al tiuj kiuj faras la liberan kaj memvolan elekton de la malriĉeco, estas certigata la regno "de la ĉielo" (ne konfuzenda kun iu regno en la ĉielo). Mateo estas la ununura evangeliisto utiliganta la esprimon "regno de la ĉielo", anstataŭ regno de Dio, laŭ la tipa tendenco de la skribistoj utiligi iujn anstataŭaĵojn por eviti eldiri aŭ skribi la dian nomon. La "regno de la ĉielo" ne antaŭenĵetas la promeson de Jesuo en iu foran estontecon (la transmondon), sed en la eblon, jam ĉeestantan, havi Dion kiel reĝon, tio estas Patro kiu prizorgas la siajn. Tiu regno iĝas realo en la momento kiam la homoj eniras en la kondiĉon de malriĉuloj: al tiuj kiuj igas sin respondecaj pri la bonfarto de propra frato Jesuo certigas ke la Patro mem certigos ilian feliĉon (Mt 6,33; 25,34-40).

Per tiu beateco Jesuo ne nur ne idealigas la malriĉecon, sed li petas al la disĉiploj kuraĝan elekton kiu permesu elimini la kialojn kiuj ĝin provokas. Pro tio la beatecoj ne nur ne estas la opio de la popoloj, sed ili estas la adrenalino, kiu stimulas vivigajn energiojn en la homaro, tiu kiu permesos al subprematoj, al senheredigitoj, al malsatantoj fine vidi la finon de ilia kondiĉo je malfeliĉo.

Alberto Maggi